# la naska fasko

*La ĉiutaga ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto*

Numero dek unu
2009-07-13
lundo


## Kio okazos hodiaŭ?

★ **7:30 ptm: *Kio estas justeco?***
**Kie: komuna salono de *Cuzco***
Rikardo gvidos diskuton (li ne prelegos).
Vidu lian artikolon pri la temo sube.

## Justeco kiel senpartieco

*de Richard* ANDERSON-CONNOLLY

Laŭ mia observado, esperantistoj ofte okupiĝas pri la ideo de justeco. Konsideru, ekzemple, la gravecon por ni de la neŭtraleco de nia internacia lingvo. Malmultaj el ni lernis Esperanton por gajni monon; alia motivo aŭ sento instigis nin al tiu ideala celo.

Niaj konversacioj ofte temas pri homaj rajtoj. De malsamaj flankoj, kaj socialisto kaj religiano laboregas por atingi tion, kion ili nomas per la sama vorto. Sed restas defiega demando: Kio estas justeco?

Por mi la plej imponaj ideoj tiurilate originas el la verko de la filozofo John RAWLS. Lia teorio nomiĝas *justeco kiel senpartieco* (angle: *justice as fairness*) kaj estas prezentita en lia libro, *Teorio de Justeco*. Miaopinie ekzistas pli da verko en etika filozofio dum la lastaj preskaŭ 40 jaroj rilate al lia verko ol al iu alia filozofia sistemo. Jen mi tradukis kelkajn frazojn el lia fina libro:


"…justeco kiel senpartieco celas al demokratia socio. Ĝiaj principoj estas desegnitaj por respondi la demandon: kiam ni rigardas demokratian socion kiel senpartian sistemon de socia kunlaborado inter civitanoj, kiujn ni konsideras liberaj kaj egalaj, kiaj principoj plej konvenas al ĝi?

Alivorte: kiaj principoj plej konvenas al demokratia socio, kiu ne nur deklaras sed serioze kredas la ideon ke civitanoj estas liberaj kaj egalaj, kaj klopodas efektivigi tiun ideon pere de la ĉefaj institucioj?" (RAWLS, 2001, p. 39)

Por RAWLS, la respondoj formas liajn du principojn de justeco:

"(a) Ĉiu homo havas la saman nevenkigeblan postulon por plene sufiĉa sistemo de egalaj bazaj liberoj, kiu akordas kun la sama sistemo de liberoj por ĉiuj; kaj

(b) Sociaj kaj ekonomiaj ne-egalecoj devas plenumi du kondiĉojn: unue, ili estu ligitaj al pozicioj kaj oficoj, kiuj estas mal-



fermitaj al ĉiuj en medio de senpartia egaleco de oportuno; kaj due, de ili devas plej profiti la malplej privilegiaj membroj de la socio (la diferenco-principo).

…la unua principo estas pli grava ol la dua; krome, en la dua principo, senpartia egaleco de oportuno estas pli grava ol la diferenco-principo. Tiu ordo signifas, ke kiam oni aplikas principon (aŭ kiam oni kontrolas ĝin kontraŭ provoj) oni supozas ke la antaŭaj principoj estas plenumitaj" (RAWLS, 2001, p. 42–43).

La diferenco-principo estas unu la plej gravaj kontribuoj de RAWLS al etika filozofio. Je la unua renkontiĝo ĝi povas esti iom malfacila, do ni konsideru ekzemplon. Por simpleco, supozu ke ekzistas nur du grupoj: A kaj B. Ankaŭ supozu nur tri eblajn distribuojn de ekonomia riĉeco (en dolaroj, verdaj steloj, aŭ ia ajn sistemo):

Stato 1: A ricevas 20, B ricevas 200;
Stato 2: A ricevas 100, B ricevas 100;
Stato 3: A ricevas 110, B ricevas 150.

La diferenco-principo elektus staton 3 ĉar plej profitas de ĝi la malplej privilegiaj membroj de la socio. Rimarku ke la diferenco-principo ne postulas tutan egalecon, kiel en stato 2. Do ne-egalaco povas ekzisti se profitas de ĝi la malprivilegiuloj. Staton 1 oni malakceptus ĉar plej profitas de ĝi tiuj, kiuj jam estas la plej privilegiaj.

La dua impona kontribuo de RAWLS estas la koncepto de la originala situacio (angle: *original position*). Tio estas pens-eksperimento per kiu oni celas imaĝi mondon kie la homoj ne scias siajn apartajn kvalitojn. Ekzemple oni ne scius ĉu oni estas viro aŭ ino, blankulo aŭ nigrulo, riĉulo aŭ malriĉulo, religiano aŭ ateisto, ktp. Oni scius nur ke oni estas homo. Tiu stato de imago nomiĝas la vualo de senscio (angle: *veil of ignorance*). En tiu stato neniu proponus sistemon bazitan sur seksa, rasa, ekonomia, aŭ religia diskriminacio aŭ ekspluato. Fakte RAWLS argumentas ke liaj du principoj de justeco estus elektitaj de homoj en la originala situacio.

Socio organizita laŭ la du principoj de RAWLS celas kaj liberecon kaj ekonomian egalecon. Do li, iasence, preteriras la streĉon en la okcidenta etika filozofio, ekzemple en John S. MILL, inter la du.

Tamen certe liaj principoj ne konformas al sistemo de "liberaj merkatoj" laŭ la senco de la nuntempe politika dekstro.

Eble vi estimas la du principojn de justeco de RAWLS. Eble ne. Ĉiuokaze la temo estas diskutebla kaj disputebla. Se vi konsentas, kunvenu en la komuna ĉambro hodiaŭ vespere ĉe la 7:30 ptm por vigla interparolado.

## *Ni rondanoj*

de Keneĉjo GOLDBERGO


Ni rondanoj
estas parencaj anime.
Ju pli ofte ni apude sidas,
des pli intime, des malpli time,
sentas ni nin.
La vojaĝo ronden devas, laŭ difino,
esti pli kaj pli facila,
la spaco inter ni pli kaj pli
trankvila.
Tion ĉi pensas unu el ni.

*[ricevis la 2-an (el 5) honoran mencion en la literatura konkurso EKRA en Bulgarujo, 2007]*

# *Usono—ĉu la estonteco de la Esperanto-movado?*

*de Micah BALES*

Preskaŭ ne ekzistas usona esperantlingva movado. Krom kelkaj urboj kie staras etaj lokaj kluboj, usonaj esperanto-parolantoj estas kiel ŝipoj sur la maro—oni povas tre longe atenti sen vidi aliajn sur la horizonto. Por homo kiel mi, loĝante en la mezo de la lando, esti esperantisto estas kiel loĝi sur insulo. Oni povas komuniki per la reto, kaj fojfoje flugi al aliaj landpartoj por koni nelonge aliajn samideanojn. Multaj, kiel en mia kazo, esperantistiĝas dum jaroj sen havi daŭran kontakton kun aliaj esperantlingvaj homoj. Multaj el ni lernas Esperanton per la reto, sed neniel povas uzi ĝin en la ĉiutaga vivo.



**Kion fari?**

Usono estas unu el la pli neesperantistaj landoj de la okcidenta mondo, kaj la cirkonstancoj de nia lando kaj kulturo(j) malhelpas nian kreskadon kiel parolkomunumo kaj la plibonigon de nia kulturnivelo ĝenerale. Ni estas malmultaj nombre, kaj el nia malmulto, multaj el ni estas tre malprofundaj esperantlingvanoj. Plibonigi nian kulturbazon kaj plialtigi niajn nombrojn estas du flankoj de la sama monero. Unuflanke, se ni usonanoj havus vere profundan kulturon kiel esperantlingva minoritato, verŝajne pli da homoj interesiĝus partopreni. Aliflanke, se pli da usonanoj esperantistiĝus, verŝajne pli el ni pli serioze uzus nian lingvon por atingi pli gravan kulturnivelon en nia parolkomunumo.

Ni usonanoj devas pli serioze klopodi por fariĝi kleraj kiel esperantlingvanoj—ni devas verki, eldoni, pli ofte renkontiĝi, kaj amuziĝi kune. Kaj ni devas pli gastigi. Kvankam Usono estas la plej forta lando en la mondo, je la Esperanto-komunumo Usono estas ege provinca, malforta lando. Ni bezonas helpon. La usona esperantlingva parolkomunumo bezonas partoprenon de alilandanoj por pliprofundigi nian kunvivon. Substrekitaj estas Brazilo, Ĉinujo, Japanujo, kaj Eŭropo ĝenerale. Ni bezonas helpon de bonvolaj homoj de relative fortaj esperantlingvaj parolkomunumoj. Ke ili venu, partoprenu, kaj montru al ni ke nia lingvo ja gravas por internacia komunikado.

Sed, finfine, la problemo estas nia. Ni mem devas preni respondecon de nia kontribuo al la internacia societo kaj kulturo. Ni mem devas montri al la mondo ke usona kulturo ion povas diri en la internacia lingvo.

Grava afero estas kunigi la vastajn nombrojn da homoj, kiuj antaŭnelonge esperantistiĝis pere de la Interreto. La granda plejparto da ili nur esperantumas ĉe siaj

komputiloj kaj neofte aŭ neniam ĉeestas esperantlingvajn eventojn. Mi rimarkas ke eble estas pli novaj usonaj esperanto-uzantoj sur la reto ol estas longtempaj membroj de Esperanto-USA. Kiel kuraĝigi ilin partopreni la pli vastan esperanto-kulturon preter la inter-geto?

Alia afero estas la verkado. Kie estas la usona verkistaro? Nur unu usondevena poemo aperis en la *Esperanta Antologio*, kiu prividis niajn unuajn cent jarojn kiel parolkomunumo. Homoj de la tuta mondo regule eldonas librojn esperantlingve—sed tre maloftaj estas usonanaj verkistoj, kiuj eldonas. Se ni vere deziras viglan esperantlingvan kulturon, ni devos pliprofundiĝi kiel esperantlingvanoj.

Eble ĉi tiu artikolo estos ricevita per kelkaj homoj kiel tro negativa. Mi esperas ke ne, ĉar mi celas male. Kian grandan potencon havas Usono kaj ĝia popolo! Kia fonto de kultura povo; kia bazo de optimismo kaj fidemo! Ni nepre konsciu pri nia ebleco por grandiozeco kaj turnu nin al kunlaboro por pli profunde klera kaj enradikigita usona esperantlingvanaro. Oni forte aŭdas tra la mondo la imperiistan, mortigan voĉon de Usono; estas ja temp' ke oni aŭdu la amikeman voĉon de la alia, libereca flanko de la usona kulturo. Se Renato CORSETTI pravas, ke Usono estas la estonteco de la Esperanto-movado, nia devo estas ja granda.



NASKanoj esploras la klifojn apud la glisejo. Foto danke al Franklin MONTENEGRO-RODAS.

## Ĉu ni iru grupe al *Harry Potter*?

La sesa filmo en la serio de *Harry Potter* ekaperos en kinejoj ĉi-semajne. Ni (nedifinita junularo) planas ĉeesti meznoktan prezenton de la filmo. Kaj ni kompreneble volas inviti ĉiujn veni kun ni. Mardon ni iros (piede) proksimume je 10:30 ptm. Biletoj kostas po $10.50 (aŭ po $6.00 por tiuj, kiuj aĝas almenaŭ 60 jarojn) kaj ni aĉetos ilin rete antaŭ mardo.

— Chris WINGROVE

*La NASKan Faskon* redaktas via afabla helpinstruisto Hoss, sed **li nepre bezonas viajn kontribuojn!** Se vi ne sentas vin komforta pri verkado, ne timu; li helpos vin korekti kaj poluri. Ĝuste nun, efektive, li senpacience kaj avide atendas viajn kontribuojn—ĉu fotojn, desegnaĵojn, artikolojn, poemojn, amo-leterojn… Sendu materialojn rete al **<nask.esperanto@gmail.com>** aŭ portu ilin piede al *Asante* #127.